# Sud-Rejna Kuriero

Oktobro 2017

Komuna inform-bulteno de
**Esperanto-Societo Basel** kaj
**Mulhouse-Esperanto**

N°67



Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr

Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch




*Karaj membroj, karaj gesamideanoj,*
*karaj legantoj,*

*Ĉi-tiu numero aperas iom pli malfrue, nur en oktobro. Fakte mi deziris aperigi en ĝi la informojn pri nia venonta Zamenhof-festo, kiu okazos ĉi-jare en Bazelo. Tamen tio ne eblis. Vi ricevos ilin per nia dissendolisto.*

*Certe la plej gravaj eventoj de ĉi-tiu somero, ja estis la Esperanto-kongresoj, kiuj okazis en Koreio. Pri tiuj eventoj pluraj gazetoj aperigis raportojn, komentojn kaj fotojn. Same ankaŭ nia regiona gazeto La Informilo raportis pri ili.Tial en ĉi-tiu numero ni menciu nur tute lokajn eventojn, kiujn niaj samideanoj jam organizis kaj partoprenis kaj pliajn okazontajn en venontaj monatoj.*



*En junio sinsekve okazis "Komuna Manĝo de nia grupo Mulhouse-Esperanto", Amika Tago en la Vogezoj" kaj "Verda Fadeno".*

*En septembro okazis agrabla migrado laŭ invito de Bavleo per trajno ekde Rastatt.*

*Krome komenciĝis niaj kursoj en Espace 110 kun novaj horaroj.*

*Krome jam estas anoncitaj novaj aranĝoj por la venontaj monatoj.*

*Profitu por jam nun aliĝi.*

*André Grossmann*

**Programo 2017** | **ESPERANTO - SOCIETO BASEL**

| | | |
|---|---|---|
| **Lundo** | **30.10.2017** | **Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis** |
| **Ĵaŭdo** | **23.11.2017** | **Monata kunveno : Programo** |
| **Sabato** | **09.12.2017** | **Zamenhofa festo en Svislando, pliaj informoj per nia dissendolisto** |

**Nicole Béroud**

# Einladung

Du bist aktiv, dein Herz schlägt für Esperanto und du wohnst auch noch in Baden-Württemberg?

Und wenn du dann noch am 28. und 29. Oktober Zeit hast, dann bist du die oder der Richtige, um für BAVELO (Esperanto in Baden-Württemberg) zum Verbandsrats-Treffen in die Esperanto-Stadt Herzberg zu fahren.

Dort versammeln sich Aktive aus möglichst allen Bundesländern, damit der Deutsche Esperanto-Bund viele gute Ideen für die Gestaltung der Zukunft sammeln kann.

Wenn du noch dazu jung bist (Schüler, Student, Auszubildender), dann bist du besonders geeignet, bei der Zukunft mitzureden. Dann zahlen wir (BAVELO) dir auch die Fahrkarte (nach vorherigem Antrag).

Neue Gesichter braucht das Land! Es gibt so viele gute Ideen, die Zukunft zu gestalten. Wir müssen sie nur zusammentragen und miteinander verbinden.

Hast du Zeit und Lust? Zwei aus Baden-Württemberg fahren auch hin, die sind im Vorstand vom Deutschen Esperanto-Bund (Julia Noe, Freiburg) beziehungsweise der Deutschen Esperanto-Jugend (Lars Hansen, Böblingen). Dauer: Freitag, 27. Oktober 2017, 19:00 h, bis Sonntag, 29. Oktober 2017, 13:00 h.

https://www.esperanto.de/de/enhavo/verbandsrat-des-deutschen-esperanto-bundes-am-2829-oktober-2017-herzberg-harz

Alois Eder für den Vorstand von Bavelo

07034-22899 oder 0163-9014703, aloiseder@arcor.de

# Jar-fina komuna manĝo en Saint-Louis-Neuweg



La lerno-jaro de nia asocio Mulhouse– Esperanto finiĝis. Por tion kune festi, ni unue esploris pri la dato kaj pri la taŭga restoracio. Antoine proponis la restoracion "Des Lys d'Alsace" en Saint-Louis-Neuweg.
Krome ni elektis ĵaŭdon la 22an de junio, plene sciante, ke tre baldaŭ okazos la "Amika Tago" en La Vogezoj kaj poste "La verda Fadeno".
Al nia rendevuo venis 10 membroj, kaj kiel gasto s-ino Pag Kyong-Ohg origine el Koreio (nun loĝanta en Saint-Louis).
Dum tiu lerno-jaro pli/malpli regule okazis la kursoj en Espace 110. La verdaj fadenoj okazis alterne en Saint-Louis kaj en Rixheim kun de 8 ĝis 12 partoprenantoj.
Certe ni ankaŭ parolis pri la someraj Esperanto-aranĝoj, ĉefe UK en Koreio, al kiu iuj vojaĝemuloj planis partopreni.
La vespero finiĝis en amika etoso kun la deziro pri agrablaj someraj ferioj.



# Amika tago en la Vogezoj en la vilaĝo Dommartin-les-Remiremont

En junio alia tradicio estas la "Amika Tago" alterne ĝi estas organizita en Frajburgo kaj en la Vogezoj. Tial Ginette proponis al samideanoj de la tri-landa regiono ĝui amikan tagon kun piknikoj por la 25a de junio. La rendevuo estis la preĝeja parkejo de la vilaĝo Dommartin-les-Remiremont.

Ege interesa propono estis vizito al la muzeo Terrae Genesis.

Al tiu rendevuo venis 14 personoj el la grupoj de Frajburgo, de Mulhouse kaj de Gérardmer. Ginette kunportis piknikajn tablojn, faldeblajn seĝojn, sed iom forgesis, ke en tiu horo la parkejo estis plena je aŭtoj pro religia ceremonio en la apuda preĝejo. Sed post iom da atendado la parkejo malpleniĝis kaj lasis al ni la eblecon bone instaliĝi. Tiam ekestis la dilemo, ĉu tuj ekmanĝi aŭ unue promeni. Ŝajne estis pli da malsatantoj, tial ni ne plu atendis por komenci la piknikon. Iuj proponis sian propran kunportitan specialaĵon al aliaj, kaj oni gustumi, ekŝatis, komentis, kune trinkis kaj babilis en agrabla amika etoso.



Nia posta rendevuo estis je la 14a en la muzeo Terrae Genesis, je 4 km de nia piknikejo, tie gvidanto atendis nin.
Sed restis sufiĉe da tempo por promeni tra la vilaĝo en agrabla suna vetero.
Poste ni veturis al la muzeo kaj ĝustatempe atingis ĝin.









La gvidanto de la muzeo estis vera fakulo, ne nur pri uzataj teknikoj por prilabori tiun graniton, sed li ankaŭ amplekse klarigis pri la historioj eventoj, kiuj ebligis krei tiun muzeon, kie antaŭe troviĝis firmao kun pli ol 200 laboristoj (ofte enmigrantoj).
Estis interese ekscii pri la teknikaj evoluoj por segi, poluri la ŝtonojn kaj fine krei skuptaĵojn, artaĵojn.



Li abunde klarigis pri la geologio de la tero, en kies centro kreiĝas plej diversaj mineraloj kun tiom da diversaj nekonataj nomoj.
La renkontiĝo finiĝis ĉe tablo de la muzeo, kie ni povis ankoraŭ manĝi alportitajn kukojn.
Ni dankis al Ginette pro tiu agrabla kaj amika tago.

Andreo

Fotoj pri tiu aranĝo estas videblaj ĉe
http://mulhouse.esperanto.free.fr

# Lasta Verda fadeno en Saint-Louis



La 26an de junio okazis nia lasta verda fadeno por ĉi-tiu lerno-jaro 2016/2017. Ĝi okazis en la restoracio de Saint-Louis "Hotel-Restaurant Porte de France", tute proksima al la landlimo kun Svislando. Tio estas oportuna okazo por la membroj de la Bazela grupo, kiuj volonte ĉeestas nian manĝon.

Pro la varma vetero ni ĝuis la eksteran terason, multe pli agrabla ol la interna salono.

Nicole informis nin pri la venonta Zamenhof-festo, kiun la grupo de Bazelo organizos en venonta decembro, sed ĉi-foje en Bazelo-mem.

Jen la kalendaro de venonta verdaj fadenoj.

- 30an de oktobro 2017 en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.
- 27an de novembro 2017 en Rixheim  La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- 29an de januaro 2018 en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.



# Esperanto en kampanjo

Esperanto ĉeestas la transliman manifestacion de la “solidaraj najbaroj” (Francio-Germanio-Svislando) -Tiu asocio organizas, kuraĝigas, kaj akompanas ĉiujn translimajn projektojn, kiuj enskribiĝas en la kadro de la solidara kaj daŭra ekonomio. Du tagoj de pripensado estis organizitaj la 23an kaj 24an de septembro en la kulturejo de Bourtzwiller (Mulhouse). Unu el la laborkunsidoj estis dediĉita al la problemo de la lingvaj baroj. Tial la DMC de Mulhouse (Domo de la Mondcivitaneco) granda defendanto de Esperanto, petis de mi, ke mi prezentu nian lingvon kiel unu el la eblaj solvoj. Bertrand prezentis sian belan ekspozicion, inaŭguritan dum la Libro-foiro de Saint-Louis. Anne kuniĝis al ni la duan tagon.

Rezultatoj: La ekspozicio ebligis la prezenton de Esperanto al kelkaj gescivolemuloj kiuj, kvankam kultur-riĉaj imagis, ke Esperanto estas jam mortinta lingvo (povraj ne esperantistoj tre mirigitaj) Pri la laborkunsido, malgraŭ unu evidenta eĉ strangeta interes-manko de la debat-gvidilo pri Esperanto, kiu estis petita de la deziro ne tro paroli pri ĝi, tiu efika neŭtrala komunikilo longe restis en la koro de la diskuto, kaj konsiderata de pluraj intervenantoj, kiel justa solvo al la problemo de la lingvaj baroj.

La fina raporto en ĝenerala asembleo tamen notis, ke Esperanto estas pli interesa kiam temas pri pluraj landoj ol kiam en tiu asocio, kie la franca kaj la germana devas resti la regulo.


**Konkludo:**

Ankoraŭ-foje ekestis la timo, ke Esperanto iĝos danĝera por la naciaj lingvoj, kiam la realaĵo estas tute mala. Tamen fronte al 80 homoj de Francio Germanio kaj Svislando oni parolis pri Esperanto: celo atingita. Cetere ni enkondukiĝis en tiu interesa asocio, do ni daŭrigos nian promocian laboron.

**Esperanto ĉe tablo.** (20a de novembre ĝis 2a de decembro) Ĉe la solidara restoracio ni jam sukcesis konvinki kaj duan fojon ni tradukos la menuojn sed ĉi-foje dum du semajnoj kaj kun la ekspozicio de Bertrand instalota dum tiu periodo. Mi proponas ke ni kune manĝu unufoje por diskuti pri la traduko de la menuo.

Ĝis baldaŭ Jacques

# Trajna "Migrado" ekde Rastatt al




Bavelo invitis la samideanojn al tia migrado, nome unue renkontiĝi en la stacidomo de Rastatt kaj poste trajnveturi al Baiersbronn.

La 23an de septembro je la 10a15 horo jam aperis sur la kvina kajo de tiu stacidomo pluraj samideanoj. Jes, ĝi estis la ĝusta rendevuejo. Baldaŭ alvenis la regiona trajno al Baiersbronn.

Ĉiuj envagoniĝis por traveturi ĉarman valon de la Nigra Arbaro. Komence ĝi estis iom mallarĝa kaj necesis traveturi plurajn tunejojn. Poste aperis larĝa valo kun belaj pejzaĝoj.



Surloke pliaj partoprenantoj aldoniĝis, ili rekte venis de pli nordaj partoj per propraj aŭtoj. Jam ni estas ĉirkaŭ 20 migrantoj.





Post iom da migrado ekde la stacidomo, ni atingis ĉe la flanko de la vojo, etan restoracion, kie eblis bonguste kaj simple manĝi ĉe ekstere instalitaj tabloj kaj sub sunombreloj. La vetero estis tre favora.







Poste estis proponite viziti la muzeon de la fabelo-verkisto Wilhelm Hauff. Li verkis inter-alie la fabelon por infanoj: "La malvarma koro". Projekciata filmo rakontis tiun fabelon. Bedaŭrinde la aŭtoro forpasis tre june nur 24-jaraĝe.





*Fotoj kaj raportoAndreo*

Post agrabla kafumado, ĉiuj decidis hejmenveturi, ĉu per la sama trajno al Rastatt ĉu per aŭto.
Entute ni pasigis agrablan tagon.
Dankon al la organizantoj

# MEDITERANEA
# ESPERANTO-SEMAJNO 2018

**Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)**

## 24an de Februaro - 3an de Marto 2018

**Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono ? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdal-arboj ! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro...**

Aliĝkotizo: 60 eŭroj (familia aliĝkotizo: 100 eŭroj)

**INFORMOJ KAJ ALIĜOJ** :

**Monique Prezioso**, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio
prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88

**Christine Graissaguel**, Les Iles d'Or, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus
kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

## ĜENERALAJ INFORMOJ

**Alveno :** De la stacidomo St Raphaël: aŭ per **buso n° 7601 al Saint-Tropez** ĝis haltejo ***Le Val d'Esquière Les Issambres***, aŭ per taksio.

**Akcepto :** sabaton la 24an de Februaro - 15:00 - **Fermo :** sabaton la 3an de Marto - 14:00 (post la tagmanĝo).

**Kurs-horaroj :** 9:00-12:00 kaj 18:00-19:00

**Partopreno en kursoj (3-nivelaj) :** Elektu vian deziratan kurson en la ĉi-suba tabelo.

**Liberaj posttagmezoj por :** bankuracado en proksima marakva banejo (800m), vizitado de Fréjus (klostro), Saint-Raphaël (muzeo), Nico, Menton, Maures-monteto (mimozo kaj pied-ekskursado), Saint-Tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, bazaro en Ventimiglia (Italio, nur vendrede), ktp.




**Ne forgesu viajn marŝo-ŝuojn por pied-ekskursi sur montetaro.**

**Distraj vesperoj** far la hotelo, Esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Kunportu viajn amuzajn kanzonojn, ludojn, ktp.

**Eblas ban-kuracadi en proksima mar-akvo-terapiejo.**

# ALIĜILO AL M.E.S. 2018

| partopre-nanto | Nomo/persona nomo | Naskiĝ-jaro | Kurso |
|---|---|---|---|
| 1a | | | |
| 2a | | | |
| 3a | | | |

Adreso

Telefono: ____________________ Ret-adreso: @

Mi loĝos ĉe Résidence Le Val d'Esquière: ¨ jes /ne

Mi partoprenos de la 24a de Februaro ĝis la 3a de marto 2018 : jes / ne

**Sendu al Christine Graissaguel** (vidu adreson ĉi-apude)

**ALIĜKOTIZO** (ne repagebla) :

☐ Plenkreskulo : 60 € ☐ Paro : 100 €

(senpaga por la malpli ol 18-jaraĝuloj)

**LOĜADO**

☐ Kompleta semajna restado (plenkreskulo) : .... x 360 € = .......... €

☐ Rabatebleco por infano (bv informiĝi) : x --- € = ......... €

☐ Suplemento por unulita ĉambro: ................. x 110 € = .......... €

☐ Popersona suplemento por ĉambro almara: x 42 € = .......... €

☐ Mi volas mem partopreni en programo per :

ALVENO

☐ Trajne (St Raphaël) ☐ Fluge (Nico)

☐ Memveture je la .............horo.

| kursoj | Kursgvidantoj | Niveloj |
|---|---|---|
| 1 | Christine GRAISSAGUEL | Vera Komencanto |
| 2A | Jarka MALA | Komenc-Parolanto |
| 2B | Kristin TYTGAT | Progres-parolanto |
| 3 | Nina PIETUCHOWSKA | Diskuto/analizo |

RESUM-PAGO


Aliĝkotizo .......... €

Restado .......... €

TUTA SUMO .......... €

Sumo pagebla :

- **per ĉeko** je la nomo de "Esperanto club St Raphaël-Fréjus", sendota kun aliĝilo al: *Christine Graissaguel, Les Iles d'or A, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus, Francio)*
- aŭ **per bankoĝiro** al : Société Marseillaise de Crédit IBAN: FR76 3007 7049 3926 6980 0020 041 BIC: SMCTFR2A ESPERANTO-CLUB- 83700 ST RAPHAEL



Jen interesa iniciato de la Moskva Esperanto-Asocio.




Irina Goncharova

Esperanta Poŝtkruciĝo estas interŝanĝo de poŝtkartoj kun esperantistoj el diversaj landoj kaj regionoj.

Ĉu ne estas bona ideo sendadi belajn bildkartojn al aliĝintaj esperantistoj, hazarde elektitaj de la aŭtomata sistemo? Ĉu ne estas agrable trovi en sia leterkesto bildkarton kun salutoj en Esperanto de nekonataj (aŭ konataj!) samlingvanoj?

Ĉu vi, aŭ via E-gelernanto, aŭ via E-gekonato estas tia homo? Do, ne prokrastu — aliĝu tuj!

Venu al la paĝaro: bildkarto.weebly.com

kaj plenigu tre simplan aliĝilon. Vi TUJ ricevos retmesaĝon kun ies adreso!

Elektu belan bildkarton, surskribu ĝin, afranku ĝin per taŭgaj poŝtmarkoj kaj forsendu ĝin. Kaj atendu surprizojn en via leterkesto! Ĝuu belecon de la bildkartoj kaj amikemon de esperantistoj el la tuta mondo! Invitu aliajn esperantistojn al la bildkart-interŝanĝo!

La 25-an tagon de ĉiu monato ĉiuj aliĝintoj ricevados novan adreson por sendi bildkarton.

Pacience atendu, senprokraste sendu!

# LUMINESK'

## 27.12.2017 - 03.01.2018

# La silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

Por nia renkontiĝo ni elektis la urbon Haltern am See (poŝtkodo 45721) en la suda monastera lando. Nia kongresejo estas seminar-domo de la katolik-sindikata movado „KAB" sur la monteto Annaberg en arbaro apud Haltern am See.

La kongresejo estas sufiĉe komforta. Ni loĝos en dulitaj ĉambroj je preskaŭ hotela nivelo kun banĉambro en ĉiuj ĉambroj. Unulitaj luksaj ĉambroj estas havebla kontraŭ krompago de 15 eŭroj/nokto. Senpaga retaliro (WLAN) haveblas. La retpaĝon de la kongresejo vi trovas per hvhs-haltern.de



## Kotizo • Programo Tempo • Teamo

| | ĝis 15.08. | ĝis 31.10. | poste |
|---|---|---|---|
| *Kotizo** | 365 | 385 | 399 |

*: Necesa antaŭpago por validigi la aliĝon: 50€.

***La kotizo inkludas*** la restadon (loĝado en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo). Unulitaj ĉambroj haveblas po 15 eŭroj por nokto.
Ĉiu, kiu loĝas en Germanujo kaj ne estas ordinara membro de GEA/GEJ, krompagas 30 eŭrojn.

*Kiam okazos la renkontiĝo?*
La aranĝo komenciĝos je la 27a de decembro kaj daŭros ĝis la 3a de januaro. La organizantoj ŝanĝis la tempon je unu tago, ĉar tio ŝajnas esti pli konvena al la deziroj de la partoprenantoj.
Parta partopreno eblas.

*Teamo*
Andreas Diemel (ĉeforganizanto)
Alfred Schubert (tema programo):
*temaprogramo@luminesk.de*
Yoshie kaj Dieter Kleemann (gufujo)
Sebastian Kirf (teĥnikaĵoj, retpaĝoj)



# Niaj kursoj en Espace 110 en Illzach

**ESPÉRANTO**

**André GROSSMANN** — Adultes et adolescents (16 ans et +)

Découvrez une langue vivante pratiquée dans le monde entier. Rapidement accessible à tous, précis, nuancé, adaptable aux évolutions des techniques et des pensées, l'Espéranto est un outil d'échange très efficace entre toutes les cultures. Une grammaire sans exception, sans verbe irrégulier.

**Mardi : 18h à 19h30** — **débutant**
**Vendredi : 18h à 19h30** — **avancé**

**Début : mardi 19 septembre**

**ACTIVITÉS LANGUES ET LITTÉRATURE**

| | | |
|---|---|---|
| **ESPÉRANTO** | Mardi 18h-19h30 débutant<br>Vendredi 18h-19h30 avancé | Année 56 € |

Refoje niaj Esperanto-kursoj estas menciitaj en la nova broŝuro de Espace 110 por la jaro 2017/2018.

En la lasta jaro ni povis okazigi la kursojn por komencantoj marde kaj por progresantoj vendrede. Tamen interkonsente kun la gelernantoj, ni decidis ilin okazigi plej ofte en la posttagmezo anstataŭ ol vespere.

La grava demando, ĉu ni sukcesos havi novajn komencantojn. Refoje mi anoncos la kurson en la lokaj gazetoj kun la unua rendevuo la 19an de septembro. Mi proponas, ke ankaŭ niaj lastjaraj gelernantoj venu en tiu tago de la 18a ĝis la 19a30.

Poste laŭ la situacio ni kune decidos kiel plej oportune organizi la kursojn.

IFEF eldonis Esperant-lingvan 24-paĝan broŝuron pri la fervoja muzeo de Mulhouse.
Ĉiu kongresano ricevis ekzempleron.
Nia asocio ankaŭ ricevis iom da ekzempleroj.
Eblas ricevi ekzempleron afrankitan por 2 eŭroj.




**La Trajno-Centro de *Mulhouse***

# Nia Kalendaro 2017

| | | |
|---|---|---|
| **Oktobro**<br><br>**2017** | **13 - 20**<br><br><br>**30** | Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30.<br>Ni kune decidos pri la horoj kaj tagoj.<br>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis |
| **Novembro**<br><br>**2017** | **7 - 14 - 21 - 28**<br><br>**27** | Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30.<br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la restoracio La Pataterie rue de l'Aérodrome, 68170 RIXHEIM |
| **Decembro**<br><br>**2017** | **5 - 12 - 19**<br><br>**9** | Kursoj por komencantoj kaj progresantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30.<br>Zamenhof-festo en Bazelo laŭ la programo |

# KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2018-2020

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno Sud-Rejna Kuriero. La membreco estas rezervitaj al la departemento 68 kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

**Ekster la departemento ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

| **Jaro** | **Reta versio (pdf)** | **Papera versio** | **Kolora ekzemplero** |
|---|---|---|---|
| 2018 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2019 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2020 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |

Eblas pagi per ĝiro al Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg aŭ par ĉeko al André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj de Esperanto-Societo Basel ne estas koncernataj per tiuj tarifoj.

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare.Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5,rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim.
Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.












## Fotoj el Koreio

Andreo



